

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 57-a radioprelego, 1964.01.01 & 04

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo.

Al niaj fidelaj aŭskultantoj ni diras niajn bondezirojn por la komenciĝanta nova jaro. Tiu jaro 1964 efektivigu kelkajn el niaj plej profunde karaj esperoj : ĝi vidu progresojn en la direkton de la konstruo de pli homeca mondo, ĝi permesu al nia lingvo eniri multajn novajn lernejojn, ĝi favoru konstruigajn kontaktojn dum ĉiam kreskanta nombro da kongresoj al personoj el plej diversaj lokoj kaj medioj.

Mi volas danki ĉiujn aŭskultantojn, kiuj sendis al mi de tempo al tempo mesaĝojn : ĉu simplajn poŝtkartojn, ĉu eĉ leterojn, por diri siajn interesojn, fari demandojn aŭ interŝanĝi ideojn. Mi esperas, ke dum la jaro 1964 tiuj rilatoj inter nia Radiostacio kaj vi ĉiuj daŭros, kaj eĉ pli intensiĝos. Mi hodiaŭ dankas s-ron Gaston Vidal el Clermont-Ferrand. Lia afabla poŝtkarto de la 28-a de novembro estas leginda. Jen kion diras s-ro Gaston Vidal : « Hieraŭ mi bone aŭskultis viajn du paroladojn pri s-ro Edmond Privat. Mi posedas la libron *Interpopola konduto* kaj ĉiam admiris tiun valoran homon, kiun mi vidis en 1955 ĉe la kongreso de Bologna. Eĉ mi posedas diskojn eldonitajn en Anglujo jam de longe, sur kiuj estas registritaj kelkaj liaj poemoj. La hieraŭa dissendo estis tre bona de la komenco ĝis la fino. Mi komprenis, ke ankaŭ vi sciis pri la eraro. » (Fino de la citaĵo.) Mi respondas al s-ro Vidal, ke se mi sciis, ke okazis erara disaŭdigo itallingva anstataŭ esperanta, estas nur dank'al lia rapida averto. Do dank'al tiu sciigo estis eble aranĝi riparigan duoblan dissendon de du prelegoj, kaj tio evitis al multaj aŭdantoj la ĉagrenon manki unu el la kvar prelegoj, kiuj formis tuton. Se mi ne povas tuj respondi al viaj mesaĝoj, tio estas ĉar mi registras po unu fojon monate miajn prelegojn. Mi loĝas sufiĉe malproksime de Berno kaj pro tio devas eviti tro oftajn vojaĝojn. Plie la verkado de prelegoj estas sufiĉe temporaba okupo. Mi do ne povas atendi la lastajn vesperojn antaŭ la registrado por tajpi miajn manuskriptojn, ĉar sen tio vi kelkfoje riskus devi aŭskulti supraĵojn malbone primeditajn. Tiu fakto ankaŭ plilongigas la respondtempon. Sed certe tio ne estas malagrabla por la regulaj aŭskultantoj. Tio eble eĉ vekas ĉe ili pli da atentemo.

La 26-an de decembro malfermiĝis por la sepa fojo en primitiva ĉaledo en Adelboden la esperantista skirestado. Tiun ĉi fojon ĝin partoprenas ĝis la 4-a de januaro 18 gesamideanoj el Italio, Germanio, Francio kaj Svislando. Kelkaj estas lertaj skiantoj, aliaj metis por la unua fojo siajn piedojn sur la skioj kaj revenas hejmen tre lacaj kaj iom malsekaj. Dum la vesperoj okazas interesaj prelegetoj pri aktualaj temoj, prelegetoj poste sekvataj de ofte pasiaj diskutoj. Do ni ne nur korpe, sed ankaŭ spirite plifortiĝas. Ni havas la impreson, ke tiu skirestado devus kaj certe povus fariĝi pli impona. Ni do vizitadas en la bela skistacio diversajn pli grandajn ĉaledojn por malkovri tiun, kiu povus ricevi pli da partoprenantoj dum la venonta vintro.

Sentiĝas en Esperantujo neceso instrui al la nova generacio nian kulturon. Ĝis nun la progreso de nia kulturo dependis tro ofte de hazardaĵoj. Inter la samideanaro nur malmultaj personoj havas sisteman superrigardon de nia literaturo kaj historio. Tio estas kaŭzata de la fakto, ke ni lernis esperanton aŭtodidakte, ke neniuj el ni havis la eblecon sekvi almenaŭ en gimnazioj, se ne en universitatoj, superajn kursojn pri nia humanismo bazita sur esperanto.

Tiom longe, kiam esperanto-pioniroj viglis en niaj rangoj, tiu manko de superrigardo sur nia kulturo ne tro sentiĝis. Sed dum la pasintaj jaroj multaj malnovaj esperantistoj forlasis nian mondon, kaj ni rimarkas kun iu timo, ke ilin anstataŭi ne estas tiel simple. Pro tio ni devas per ĉiuj niaj fortoj esplori la eblecojn organizi dum la ferioj regulajn kursojn, kie estas eble ricevi sisteman instruadon pri nia kulturo. Ni esperas en Svislando povi malfermi unu el tiuj kursoj jam dum la paskaj feritagoj, tio en la bela kantono Tiĉino. Ni studus la evoluon de nia lingvo tra la jardekoj, la pliriĝigon de nia literaturo, la influon de la tradukaĵoj sur la

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 57-a radioprelego, 1964.01.01 & 04

originalaĵoj kaj dum gramatikaj momentoj respondus al la demandoj de la kursanoj. Se tiu manifestacio sukcesos, kiel nia skirestado, ĝi povos fariĝi regula paska universitato.

Apud tiuj feriaj kursoj, kiuj dependas ĉefe de ni, ni devas devigi la lerneajn instancojn garantii al niaj infanoj kursojn, kie ili povas ne nur lerni la elementojn de nia lingvo, sed kiel por aliaj lingvoj, konatiĝi kun la valoraĵoj de nia kulturo. La esperantistaj gepatroj devus organizi sin en asocion, kiu ĉiujare petus al la instrudepartementoj malfermi tiajn kursojn. Ili klarigus en tiuj petoj sian rajton vidi siajn infanojn instruatajn en unu el la hejmaj lingvoj. Sed por povi tion entrepreni la esperantistaj gepatroj devus unue sisteme paroli la mondan lingvon al siaj infanoj. Mi proponas al vi tre favoran momenton por fari tion : tio estas la enlitiĝo. Tiam la infanoj ŝatas aŭdi rakontojn. Kial tiuj rakontoj ne okazus en esperanto ? Se vi ne posedas sufiĉe da tekstoj, tiam abonigu al la *Gepatra Bulteno* kaj aĉetu la belajn infanajn librojn, kiuj ekde kelkaj jaroj pliriĉigas nian librostokon. Se pere de tiu didaktika materialo vesperon post vespero vi rakontos la samajn historiojn (la infanoj ŝatas reaŭdi multfoje rakontojn), vi ne nur donos al viaj infanoj du hejmajn lingvojn : la gepatran kaj la mondan, sed vi samtempe alportos unu el la plej utilaj kontribuoj al la konstruo de la morgaŭa mondo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon, Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-